WWW.ESPERANTO.CAT

KATALUNA ESPERANTISTO*

*Llengua internacional i drets lingüístics

NÚMERO 370 (núm. 2 de la 6a època) · DESEMBRE/DECEMBRO 2021



Planlingvoj

Llengües planificades

Esperanto i anarquisme als Països Catalans

Entrevista a M. Dolors Godoy



Foto: Miguel Á. Padriñán

Kataluna Esperantisto és una publicació semestral en català i esperanto de l'Associació Catalana d'Esperanto sobre els drets lingüístics, les llengües de relació internacional, les llengües minoritzades i la història i actualitat de l'esperanto i de les llengües planificades.

Edita: Associació Catalana d'Esperanto
Apartat 1008 - 08200 Sabadell
www.esperanto.cat
info@esperanto.cat

Consell de redacció: Xavier Alcalde, Nicolau Dols, Pere Fornells, Montserrat Franquesa, Chus (Jesús García Cano), Pedro Martín Burutxaga, Òscar Puig, Alfons Tur, Carles Vela i Sandra Vives

Assessorament lingüístic: Hèctor Alòs (esperanto) i Alexis Llobet (català)

Composició: Ferriol Macip i Bonet

ISSN de l'edició en paper: 2014-8364

ISSN de l'edició electrònica: 2014-8372

Dipòsit legal: B-27362-1982

Pri la enhavo de la kontribuoj responsas la aŭtoroj mem. Nur la redaktora saluto esprimas opiniojn de la eldonisto KEA.
Els autors que signen els articles són els responsables dels seus continguts. L'opinió de KEA només s'expressa a través de l'editorial

Imprès a: Recordgraf, C/ Mandoni, 6
08004 Barcelona

NASKIĜO KAJ MALLONGA HISTORIO DE IDO

Gonçalo Neves[1]

En 1900 okazis rekorda nombro da internaciaj kongresoj: ne malpli ol 242, plejparte (87,2%) en Parizo.[2] Samjare, inter la 13a de julio kaj la 12a de novembro (do, dum entute 212 tagoj), la franca ĉefurbo gastigis ankaŭ Universalan Ekspozicion, kiun vizitis preskaŭ 51 milionoj da homoj. Inter ili troviĝis Louis Couturat, franca logikisto, matematikisto kaj filozofo, membro de la organiza komitato de la Unua Internacia Filozofia Kongreso –kiu tiujare okazis en Parizo, inter la 2a kaj la 7a de aŭgusto[3]– kaj Léopold Leau, franca matematikisto, lia iama samskolano. Ĉi lastan la multaj kongresoj igis mediti pri la problemo de planlingvo, pri kiu li tiam "sciis malmulte".[4]

Rezulte de siaj postaj esploroj, Leau samjare publikigis broŝuron,[5] en kiu li prezentis jenan planon: la elekton de tia lingvo prefere faru grupo aŭtoritata; tiucele ĉiu kongreso (aŭ societo) favoranta tiun ideon elektu delegitojn, kiuj elektu komitaton, kaj ĉi lasta invitu la akademiojn elekti lingvon universalan; okaze de rifuzo, ĝin elektu la komitato mem. Leau komunikis sian planon al Couturat, kiu jam antaŭe interesiĝis pri la problemo, pro sia okupiĝo pri la verkaro de Leibniz, kaj kiu en 1900, en sia universitata libertempo, studis du planlingvojn (Esperanto kaj *Langue Bleue*) kaj trovis la unuan "mirinde facila".[6]



Unua Ido-kongreso, Vieno 1921.

Couturat "tuj adoptis" la planon de Leau, kaj inter ili "komenciĝis kunlaborado, kiu starigis solidan amikecon".[7] Ili kontaktis nur malmultajn kongresojn, el kiuj kvin aprobis la planon de la du samcelanoj kaj elektis delegitojn. La unuaj delegitoj kunvenis la 17an de januaro 1901 ĉe Leau[8] kaj interkonsentis pri la programo de la Delegitaro (oficiala nomo, franclingva, *Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire internationale*, ordinare konata kiel 'Delegacio' en Esperanto). Leau estis ĝia sekretario, kaj Couturat la kasisto, "sed vere ankaŭ sekretario, treege aktiva".[9] La dua forlasis sian profesoran karieron por dediĉi sin "sen mona valoro" al tiu tasko, dum la unua okupiĝis pri ĝi "profesie".[10]

> La Komitato fine "decidis alpreni principe Esperanton, pro ĝia relativa perfekteco kaj pro la multaj kaj diversaj aplikoj jam ricevitaj de ĝi, sub kondiĉo de iaj modifoj efektivigotaj"

1 **Gonçalo Neves** estas verkisto, tradukisto, lingvoinstruisto kaj leksikografo en Esperanto. Eklernis ankaŭ aliajn planlingvojn kiel Volapük, Ido kaj Interlingua.

2 Vd. Rasmussen 1989: 24.

3 Vd. Schmid 2001: 125, 146.

4 Leau 1932: 1.

5 Vd. Leau 1900.

6 Laŭ lia letero al Bertrand Russell je 1900-11-05 (Vd. Schmid 2001: 204).

7 Leau 1932: 2.

8 Vd. Couturat/Leau 1907b: 1.

9 Leau 1932: 3.

10 Leau 1932: 2.

La Delegacion helpis kaj apogis ankaŭ prestiĝaj esperantistoj, i.a. Sebert, Bourlet, Michaux, Moch kaj Javal. Dume Couturat kaj Leau lanĉis internacian peticion al la akademioj, kiu kolektis kreskantan nombron da subskriboj: 277 fine de 1902, 429 en majo 1903, 720 en junio 1905 kaj 1250 je la 7a de oktobro 1907. Kreskis ankaŭ la nombro da aliĝintaj societoj: 115 en novembro 1902, 171 en novembro 1903, 220 en novembro 1905 kaj 310 en 1907.[11]

Por impulsi sian iniciaton, Couturat kaj Leau decidis traesplori la historion de planlingvoj, kaj en 1903 ili aŭtoris prian mejloŝtonan verkon, tre ampleksan, en kiu ili prezentas, klasifikas kaj analizas ĉiujn konatajn planlingvojn kaj projektojn. Al Esperanto ili dediĉas ne malpli ol 60 paĝojn,[12] plejparte favorajn, kvankam tie aperas jam kritikoj pri kelkaj vortfaraj kutimoj renkontataj en tekstoj de bonaj aŭtoroj. En 1907 ili publikigis suplementan verkon ege malpli ampleksan, en kiu ili revuas la planlingvojn kaj projektojn (aŭ ties novajn versiojn), kiuj dume aperis. En ĝi ili dediĉas al Esperanto 20 paĝojn,[13] en kiuj ili i.a. resumas la historion de la movado de post 1903 kaj detale prezentas la reforman projekton el 1894, kiu videble vekis ilian atenton.

Tamen, malgraŭ tiom da laboro, demarŝoj kaj apogoj, la Delegacio ne atingis sian unuan celon, ĉar la 30an de majo 1907, per 12 kontraŭaj voĉdonoj, 8 favoraj kaj 1 sindeteno, [14] la Internacia Asocio de Akademioj, fondita en 1900, rifuzis enskribi la demandon pri lingvo internacia en la tagordon de sia ĉiutrijara kunsido, okazonta en Vieno. De tiam, la elekto de tia lingvo apartenis nur al la Komitato, kiun elektis la delegitoj de la societoj la 25an de junio 1907. El la 331 delegitoj, 253 voĉdonis, kaj la membroj de la Komitato ricevis pli ol 242 voĉojn.[15] La kalkuladon de la voĉdoniloj kontrolis generalo Sebert.[16] La Komitato konsistis el du sekretarioj (Couturat kaj Leau) kaj 12 membroj.[17] Ĝi kunvenis en Parizo, en *Collège de France*,[18] en 18 sesioj "longaj kaj lacigaj", [19] de la 15a ĝis la 24a de oktobro 1907. Ne ĉiuj elektitoj partoprenis, kaj kelkaj uzis la statutan rajton sendi anstataŭanton kun prokuro. Estis reprezentataj sep gepatraj lingvoj (franca, germana, angla, dana, itala, pola kaj rusa) kaj ses sciencaj fakoj (lingvistiko, astronomio, matematiko, kemio, medicino, filozofio).[20]

La Komitato analizis plurajn planlingvojn aŭ projektojn antaŭe publikigitajn aŭ speciale prezentitajn por la okazo,[21] i.a., evidente, Esperanton, por kiu pledis L. de Beaufront, kiel oficiala reprezentanto de Zamenhof, "dum 5 horoj" kaj "antaŭ dek personoj".[22] Dum "kvin sinsekvaj sesioj", sub la direktado de Gaston Moch,[23] la komitatanoj analizis kaj pridiskutis ankaŭ novan projekton –prezentitan de Couturat[24] kaj subskribitan de pseŭdonimulo (*Ido*)–, pri kiu ili antaŭe ricevis, jam la 15an de oktobro, tri dokumentojn: franclingvan gramatikon, ekzercaron kaj specimenan vortaron.[25]

En sia lasta sesio, la 24an de oktobro, posttagmeze, la Komitato "deklaris, ke la teoriaj diskutoj estas fermitaj, kaj elektis la konstantan Komisionon (*Commission permanente*), kies unua tasko estos studi kaj fiksi la detalojn de la lingvo alprenota"[26] kaj kiu konsistis el Wilhelm Ostwald, Otto Jespersen, Baudouin de Courtenay, Couturat kaj Leau. La Komitato ankaŭ decidis, ke "neniu el la lingvoj ekzamenitaj povas esti alprenata 'bloke' kaj sen modifoj". Post longa diskuto, la Komitato fine "decidis alpreni principe Esperanton, pro ĝia relativa perfekteco kaj pro la multaj kaj diversaj aplikoj jam ricevitaj de ĝi, sub kondiĉo (*réserve*) de iaj modifoj efektivigotaj de la konstanta Komisiono en la direkto (*dans le sens*) definita per la konkludoj de l' Raporto de la Sekretarioj kaj per la projekto de *Ido*, penante interkonsenti kun la esperantista Lingva Komitato",[27] kaj post alitema diskuto la Komitato decidis ankaŭ "aligi S^ron^ de Beaufront al la konstanta Komisiono, pro lia speciala kompetenteco".[28] Ĉiujn decidojn faris unuanime la naŭ komitatanoj tiam ĉeestantaj.[29] Couturat ne perdis tempon kaj tuj informis la esperantistojn.[30]

La konstanta Komisiono kunvenis nur unufoje, la 25an de oktobro matene. Ĉeestis Ostwald, Baudouin de Courtenay, Jespersen kaj Couturat. Oni diskutis diversajn praktikajn demandojn, sed la Komisiono disiĝis, decidinte fini la diskutojn per kores-

11 Vd. Leau 1932: 4.

12 Vd. Couturat/Leau 1903: 304–363.

13 Vd. Couturat/Leau 1907a: 25–44.

14 Vd. Leau 1932: 5–6.

15 Vd. Couturat/Leau 1907b: 1.

16 Vd. Jespersen 1920: 3.

17 Vd. kompletan liston kun detaloj pri profesioj kaj postenoj en Cherpillod 2007: 14.

18 Vd. Sanzo 1991: 91.

19 Jespersen 1920: 3.

20 Vd. Jespersen 1920: 3.

21 Vd. detalojn pri la precipaj lingvoj kaj projektoj analizitaj, en Couturat/Leau 1907b: 5–18.

22 Beaufront 1907: 217.

23 Vd. Couturat/Leau 1907b: 21.

24 Vd. Jespersen 1920: 13.

25 Vd. Beaufront 1925: 5. El tiuj tri dokumentoj, nur la gramatiko ankoraŭ estas disponebla hodiaŭ en bibliotekoj (Vd. Ido 1907 kaj Carlevaro k.a. 2020: 37).

26 Couturat/Leau 1907b: 25.

27 Couturat/Leau 1907b: 26.

28 Couturat/Leau 1907b: 27 (ĉiuj tekstoj de la deklaro kaj decidoj laŭ la esperanta traduko de Couturat/Leau 1908b: 13, kun sola anstataŭigo de "komisio" per "komisiono", laŭ la nuna lingvouzo).

29 Ostwald, Baudouin de Courtenay, Jespersen, Dimnet, Hugon, Moch, Rodet, Couturat kaj Leau (Vd. Couturat/Leau 1907b: 27).

30 "S-ro Couturat, tuj post la fino de la kunsidoj de la Delegacia komitato, dissendis al multaj esperantistoj (membroj aŭ ne membroj de la Lingva Komitato) novan broŝureton 'Kompleta Gramatiko di la Linguo Internaciona da Ido' " (Corret 1908a: 176).

pondado, kaj, se necese, ree kunveni. Ĝi ricevis poste kelkajn proponojn, kaj de siaj membroj, kaj de eksteruloj, rilate al diversaj gramatikaj punktoj. Ĉiujn proponojn oni komunikis al la membroj kaj letere diskutis. La 13an de decembro, laŭ la deziro esprimita de la prezidanto Ostwald, la sekretarioj sendis al la membroj demandaron kun ĉiuj demandoj diskutitaj kaj decidotaj. La voĉdonadon pri tiu demandaro oni fermis la 20an de februaro 1908.[31]

Tamen, ĉirkaŭ unu monaton antaŭe, la 18an de januaro, Zamenhof kaj Boirac, per apartaj leteroj, jam anoncis al Ostwald la definitivan rompon de la traktado kun la konstanta Komisiono.[32] De tiam Esperanto kaj la nova lingvo estis sekvontaj apartajn vojojn. La etoso fariĝis streĉita, ne nur ĉar la celpubliko de la du lingvoj estis (preskaŭ) la sama, sed ankaŭ tial, ke la esperantistoj pli kaj pli komencis miri kaj dubi pri la rolo de L. de Beaufront en la tuta afero.[33] Fine, en la maja numero de *L'Espérantiste* –kiu ŝajne aperis nur la 19an de julio[34]– L. de Beaufront levis la vualon kaj deklaris, en artikolo dulingva (france kaj Esperante, dukolumne), ke li estas la pseŭdonimulo Ido, aŭtoro de la projekto prezentita al la Komitato. Tamen tiu deklaro estas pli frua, ĉar ĝi portas la daton "10 februaro 1908", kurioze nur en la franclingva kolumno.[35] Kiam la esperantistoj ekkonis ĝian enhavon? Se ne pli frue, en aprilo ĝi probable jam estis konata al kelkaj, ĉar tiam Cart, parolante pri la homo, "pri kies fideleco al nia lingvo neniu povis dubi", senplie asertis, ke "li eĉ enŝovadis, por tiel diri, sub nomo de Ido sian propran kreitaĵon (?), lingvon *Adjuvanto*, iom aranĝitan laŭ principoj de Sro Couturat". Fakte, Corret asertos poste, en julio, ke la 'Deklaro de Ido' estis "jam de kelka tempo publikigita kaj dissendita de S-ro Couturat".[36]

Tamen iuj suspektis ankaŭ pri la rolo de Couturat, kiu ja en 1912 sentis la bezonon pravigi sin kontraŭ Bourlet, akuzinta lin pri kunaŭtoreco de la nova lingvo.[37] Berger, transirinte de Ido al Occidental, minacis malkaŝi "la veron" jam en 1932,[38] sed tion li plenumis ne pli frue ol en 1937, do post la morto de L. de Beaufront (1935)... Tiam li asertis: "Ni povas malkaŝi la veron kaj ĝin pruvi per la aŭtentaj dokumentoj: la vera aŭtoro de Ido estas ne [L.] de Beaufront, sed Couturat mem. [...] La legado de liaj abundaj korespondaĵoj pruvas, ke jam plurajn monatojn antaŭ la kunveno de 1907 Couturat ellaboris reformo-planon kaj ĝin prezentis al siaj intimaj amikoj".[39] Berger ne publikigis faksimilon de la "aŭtentaj dokumentoj", sed mi ne dubas, ke ili ekzistas, aŭ ekzistis, eĉ tial ke Waringhien poste havis la okazon konsulti kaj kopii korespondaĵojn inter Michaux, Beaufront, Couturat kaj Lemaire, kaj la elĉerpaĵoj publikigitaj de li (tradukitaj el la franca)[40] montras, ke ankaŭ Couturat (krom L. de Beaufront) ludis konsiderindan rolon en la konceptado kaj ellaborado de la Idoprojekto poste prezentita al la Komitato, kaj ke eĉ Michaux kaj Lemaire iom kontribuis per propraj sugestoj.

Se ne ĉio estas klara rilate la (kun)aŭtorecon de Ido, ĉio tamen facile travideblas pri la posta ellaborado kaj evoluo de la nova lingvo. En marto 1908, baldaŭ post la rompo de la rilatoj kun la Lingva Komitato, eliris ja la unua numero de la revuo *Progreso*, "dediĉita al la disvastigo, libera diskutado kaj konstanta perfektigado de la Lingvo Internacia". En la unua numero preskaŭ ĉiuj tekstoj estis en Esperanto, kaj nur tre malmultaj en Ido, sed la kvanto da Ido-tekstoj kreskis laŭgrade en la sekvaj numeroj, kaj baldaŭ la revuo fariĝis vera Idoperiodaĵo, kvankam ĝi plu publikigis studojn kaj leterojn en Esperanto kaj eĉ en aliaj planlingvoj aŭ projektoj, laŭ tre liberala redaktora politiko de Couturat. Ĉiu rajtis esprimi sian opinion kaj prezenti siajn proponojn. De tempo al tempo la Ido-akademio voĉdonis pri la proponoj (preskaŭ ĉiam pri novaj vortoj), kaj la vortoj aprobitaj fariĝis oficialaj. La revuo interrompiĝis en 1914, pro la morto de Couturat (en aŭtomobil-akcidento) kaj la ekflagro de la unua mondmilito: sep volumoj, 80 numeroj kaj ĉirkaŭ 5.000 paĝoj, kiuj kondukis la Ido-projekton al la stato de stabiliĝinta lingvo, atinginta preskaŭ la formon, kiun ĝi havas nun.

La Ido-movado, tiam kreskanta kaj fortikiĝanta, suferis doloran baton, ne nur pro la forpaso de Couturat, sed ankaŭ pro la mondmilito, kiu i.a. devigis la idistojn nuligi sian unuan kongreson, okazontan inter la 6a kaj la 8a de septembro en Luksemburgo. Post la milito la movado regrupiĝis ĉirkaŭ la revuo *Mondo* (fondita en



Louis de Beaufront

31 Vd. Couturat/Leau 1908a: 9–10.

32 Vd. Korĵenkov 2005: 48.

33 Ŝajnas, ke, tuj post la sciigo de la decidoj de la Komitato, kelkaj esperantistoj komencis suspekti pri la konduto de L. de Beaufront, ĉar li sentis la bezonon pravigi sin jam en novembro: "mi ne estas la kulpulo pri juĝo farita de dek aliaj personoj" (Beaufront 1907: 217).

34 Vd. Corret 1908b: 318.

35 Vd. Beaufront 1908: 99.

36 Corret 1908b: 318.

37 Vd. Neves 2019: 16–17.

38 "Nun, post 25 jaroj, ne estas tro frue por publikigi la sekretajn dokumentojn!" (Berger 1932: 83).

39 Berger 1937: 71.

40 Vd. Waringhien 1990.

1910), ekfloris kaj travivis, dum la 20aj jaroj, sian apogeon (kvantan kaj kvalitan), kun la unuaj internaciaj kongresoj: Vieno (1921), (1922), Kassel (1923), Luksemburgo (1924), Torino (1925) kaj Prago (1926). Tamen la naskiĝo de la planlingvoj Occidental (1922) kaj Novial (1928) altiris multajn valorajn kaj aktivajn idistojn, kio videble kaj neripareble malfortigis la movadon. Malgraŭ la reapero de *Progreso* en 1931 kaj la pria entuziasmo, la movado neniam sukcesis regajni la antaŭan viglon, eĉ ne en la 60aj jaroj, kiam ĝin ekskuis la eksterordinara figuro de la belga advokato Andreas Juste (1918–1998), kiu poste brilis dum tri jardekoj kaj fondis la modernan Ido-poezion, ne nur per la publikigo de 18 originalaj poemaroj kaj du ampleksaj kolektoj da poemoj tradukitaj el pluraj lingvoj, sed ankaŭ per multegaj artikoloj kaj studoj publikigitaj en *Progreso* kaj aliaj Ido-periodaĵoj.

La Ido-movado pluas ĝis nun, kun kvar regulaj paperaj periodaĵoj,[41] ĉiujara renkontiĝo, ĉiusemajna videokonferenco (ekde 2020), pluraj grupoj ĉe la sociaj retoj, regula publikigo (ĉefe bita) de originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj (kiu eĉ atingis rekordan nombron en 2019),[42] sed ĝi malfacile sukcesas altiri novajn interesatojn, precipe se temas pri junuloj kaj virinoj. ■

41 *Progreso* (en Nederlando), *Ido-saluto* (Germanio), *Kuriero Internaciona* (Francio), *Ad-avane* (Hispanio).

42 Vd. Neves 2020.

BIBLIOGRAFIO

Beaufront, Louis de (1907): “Mia rolo antaŭ la Delegacia Komitato”. *L’Espérantiste*, novembro 1907, n-ro 10 (115), p. 217.

Beaufront, Louis de (1908): “Déclaration de Ido / Deklaro de Ido”. *L’Espérantiste*, majo 1908, n-ro 5 (121), p. 99–100.

Beaufront, Louis de (1925): *Kompleta Gramatiko Detaloza di la Linguo Internaciona Ido*. Esch-Alzette. Meier-Heucke. 232 p.

Berger, Ric (1932): “Li veritá pri le Delegation de 1907”. *Cosmoglotta*, nov.-dec. 1932, n-ro 6 (85), p. 81–83.

Berger, Ric (1937): “Li ver historie del lingue international secun documentes autentic e inconosset”. *Cosmoglotta*, aŭg. 1937, n-ro 5 (116), p. 65–80.

Cherpillod, André (2007): *Ido, unu jarcenton poste*. Courgenard: La Blanchetière. 48 p.

Carlevaro, Tazio k.a. (2020). *Bibliografio di Ido*. 3ma edito plubonigita e kompletigita til julio 2020. Bellinzona: Hans Dubois. 315 p.

Cart, Th(éophile) (1908): “Lastaj, necesaj klarigoj”. *Lingvo Internacia*, aprilo 1908, n-ro 4 (172), p. 145–149.

Corret, P(ierre) (1908a): “Adjuvanto kaj la Delegacio”. *Lingvo Internacia*, aprilo 1908, n-ro 4 (172), p. 168–185.

Corret, P(ierre) (1908b): “Adjuvanto kaj la Delegacio. VII – Malfrua konfeso”. *Lingvo Internacia*, julio 1908, n-ro 7 (175), p. 318–322.

Couturat, Louis / Leau, Léopold (1903): *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette. xxx + 576 p.

Couturat, Louis / Leau, Léopold (1907a): *Les nouvelles langues internationales*. Paris: Hachette. 110 p.

Couturat, Louis / Leau, Léopold (1907b): *Compte rendu des travaux du Comité*. Coulommiers: Imprimerie Paul Brodard. 32 p.

Couturat, Louis / Leau, Léopold (1908a): “Raporto pri la laboroj de la Konstanta Komisio”. *Progreso* I (n-ro 1, marto 1908), p. 9–11.

Couturat, Louis / Leau, Léopold (1908b): “Kroniko”. *Progreso* I (n-ro 1, marto 1908), p. 11–20.

Ido (1907): Grammaire complète de la langue internationale par Ido. Kompleta gramatiko di la linguo internaciona da Ido. Paris: Chaix. 71 p.

Jespersen, Otto (1920): *Historio di nia Linguo. History of our Language*. and *Artificala Lingui pos la Mondmilito. Artificial Languages after the World War*. London: J. Warren Baxter. 44 p.

Korĵenkov, Aleksander (2005): *Historio de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj. 128 p.

Leau, Léopold (1900): *Une langue universelle est-elle possible ?*. Paris: Gauthier-Villars. 13 p.

Leau, Léopold (1932): *Historio dil delegitaro por la adopto di helpanta linguo internaciona*. Uniono por la Linguo Internaciona (Ido). 8 p.

Neves, Gonçalo (2019): *Esperanto kaj Ido: malsamaj vojoj sur Parnason. Kompara studo pri la disvolviĝo de Esperanto kaj Ido kiel poeziaj lingvoj*. Espinho: Eldonejo Drako. 98 p. (bitlibro)

Neves, Gonçalo (2020): “2019: rekordala yaro en la Ido-literaturo”. En: *La blua plumo*, 2021-01-10. http://labluaplumo.blogspot.com/2020/01/2019-rekordala-yaro-en-la-ido-literaturo.html

Rasmussen, Anne (1989): “Les Congrès internationaux liés aux Expositions universelles de Paris (1867-1900)”. *Mil neuf cent*, n°7, p. 23–44.

Sanzo, Ubaldo (1991): *L’artificio della lingua. Louis Couturat 1868–1914*. Milano: FrancoAngeli. 111 p.

Schmid, Anne-Françoise (2001): *Bertrand Russell. Correspondance sur la philosophie, la logique et la politique avec Louis Couturat (1897–1913)*. Paris: Éditions Kimé. 735 p.

Waringhien, Gaston (1990): “Kulisaj manovroj”. En: *1887 kaj la sekvo*... Dua eldono, reviziita kaj ampleksigita. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo. 312 p. [p. 149–164].■